



BOLETIN

DE LA FEDERACION ESPERANTISTA ESPAÑOLA

MAYO
1950
Ruzafa, 7
VALENCIA
(ESPAÑA)

DISTINTA MANERA DE SER

Cuando se dice, corrientemente, que el sentido común es el menos común de los sentidos, no se yerra gran cosa al enjuiciar la sindéresis de la masa humana, considerada como un todo. Y lo desagradable de tan depresivo juicio es que, por lo general, el buen sentido de muchos queda invalidado por la mentecatez de unos pocos.

Esto es tan cierto en Versalles como en Singapur, y lo mismo ocurría en la edad de piedra, como ocurre en esta nuestra de los platillos volantes.

No menos conocido es el fenómeno, en el orden moral, de la solvencia individual de cada uno de los componentes de una colectividad, en contraste con el escaso valor gregario del conjunto. Así, el Sr. A, el Dr. B y el joven C, son todos personas correctísimas en su vida privada y profesional; pero, sentados en la grada de un estadio, pierden veinte siglos de cultura y descienden a la edad de las cavernas. Al volver a los cauces de su ambiente normal, se avergüenzan de su actitud circunstancial y procuran aminorar su culpa, achacándola a las «arbitrariedades» de un árbitro o a las «provocaciones» del equipo contrario. Pero, a la vuelta de una semana, la pasión del momento produce el mismo resultado de un rebajamiento moral colectivo.

Y lo mismo sucede cuando se trata de enjuiciar los términos de un problema cultural, o de adoptar una actitud definida, ante un asunto ya sancionado por la razón o por personas competentes en la materia. Muchos conocen el efecto preventivo de algunos medicamentos contra ciertas enfermedades peligrosas. Sin embargo, la toma de la pócima salvadora debe ser administrada ante la mirada vigilante de un oficial responsable de tal misión, pues los que deben beneficiarse con el método lo aceptan a regañadientes, cuando no procuran esquivarlo.

¡Y eso que se trata de la conservación de la vida!...

Así pues, no tiene nada de extraño que, ante un problema de uso práctico, como es el de un idioma auxiliar —resuelto hace ya muchos años por el Esperanto— la masa permanezca también indiferente; como es natural que la mayor parte lo ignore y aun que otros, conociendo su existencia —y hasta su excelencia— no hagan esfuerzo alguno para aprenderlo o para divulgarlo. Pero que, por parte de personas responsables, se observe la misma ignorancia o la misma indiferencia, ya no tiene tanto perdón, aunque es también perfectamente explicable. Y es que, en este aspecto de las evidentes ventajas de un idioma auxiliar, como en otros muchos de índole cultural, la verdad está en posesión de una minoría y no de la masa.

A nosotros, esperantistas consecuentes y conscientes, corresponde esforzarnos en difundir y propagar nuestro maravilloso lenguaje para que, en su día, sea preciada posesión de todos, y no de nosotros solos. En este aspecto no queremos ser miembros privilegiados de una minoría selecta, sino parte integrante de un amplio conjunto, donde con un gran cariño por el idioma propio, y un gran respeto por el ajeno, podamos entendernos todos con el Esperanto, común a unos y a otros.

Esto es de una lógica sencilla y clara; pero la claridad y la sencillez no son motivos suficientes para abrir camino entre las apreturas de la gente.

Hace falta que se vea un beneficio material, inmediato y fácil. Y eso debe ser el punto de mira de nuestra propaganda, y ese será el tema de nuestro próximo artículo.



KIEL MI FARIĜIS AMIKO DE ĈAMO

El la itala gazeto «Verda Steloto» ni represas jenan artikolon, kiu certe estos agrable legata

Lerta alp-ĉasisto rakontis al mi kelkajn maloftajn scenojn de la vivo de ĉamoj, kiujn li persone ĉeestis; kaj li ankaŭ diris al mi, kial li de pli ol dek jaroj ne plu ĉasas tiujn akrobatajn loĝantojn de la alpoj. Jen lia rakonto:

«La montaroj en la tagiĝo komencis elmontri siajn gigantajn siluetojn; la lumo rapide malsupreniris en arboriĉan valon, sub la monto Brokan, en la Mar-Alpoj. La frostigita grundo krakis sub la dikaj najloj. Sur la neĝo, tie kaj tie, elstaris densaj brunflavaj makuloj, tero pluvinta de la supro de la pintoj; estis ankaŭ videblaj la signoj de la saltoj de egaj terblokoj.

Sed tiu makulo moviĝas! Instinkte mi kaŝis min, kaj tiel mi povis ĉeesti allogan spektaklon, kiun certe multaj personoj havis la ŝancon ĉeesti: sub miaj okuloj sin prezentis la libera vivo de la ĉamoj. Ĉamino ekzercadis sian idon pri la trairo de kliniĝinta glaciejo: la daŭra zorgo de la patrino, kaj la senlerteco de la ido, estis vere korduŝantaj. Tuj, kiam la mallertulo glitis, la patrino rapide sin longigis sur la glacio por haltigi la glitadon valen; poste ŝi remetis sian idon sur la ĝustan vojon, daŭrigante la lecionon ĝis la venonta faló: atinginte la finon de la glaciejo, ŝi ripetis la vojon revene...

Alia matenon mi povis observi alian amuzplenan spektaklon; centoj da ĉamoj — tiam la grupoj da ĉamoj estis ankoraŭ sufiĉe nombraj — sin donis al la ĝojo de la glitado sur la neĝo: la ĉamoj grimpis unuope ĝis la pinto de la monteto, kaj tiam, unu post la alia, ili glitis valen ĝis la bazo, por tuj rekomenci la ludon, laŭ mirinda ordo kaj disciplino; ili aspektis kiel ĝojplenaj buboj.

Iutage, kiam mi grimpis al Monto Ĉjaminejas, ĉamo sekvis min dum kilometroj, je la distanco de centoj da metroj... kaj mi, unuamomente, ne kapablis pravigi tiun strangan emon al mi; poste mi komprenis: en mia sako mi havis iom da salo, kaj eble dum mia halto ĉe fonto iu ero elfalis. pro tio la ĉamo (ili estas tre salemaj!) sekvis min kiel kapro... Mi lasis ĝin por li, sur iu roko, kaj tuj li profitis je tiu malofta frandaĵo.

Kaj nun mi klarigos, kial jam de

dek jaroj mi ne plu ĉasas la ĉamojn:

Mi estis decidinta pasigi nokton ĉe tranoktejo, kun la intenco atingi frumatenen la pinton de Monto Brokan. La vespero estis malvarma kaj stelplena, sed dum la nokto, kiel ofte okazas en la montaro, la tempo rapide ŝanĝiĝis, kaj matene neĝuragano neatendite eksplodis; post kelkaj minutoj la neĝo atingis duonmetron. Mi eliris en tiun neĝkirlaron kaj de supre plorbleko atingis min: mi ekvidis nigran blokon, kiu saltante malsupreniris en la neĝon jam profundan: estis granda ĉamo, belega virĉamo. La tuja danĝero alproksimigis la beston al la viro, nuligante la instinktan timon, por peti de li helpon: mi tuj pensis, ke per tia gvidanto, plenfide mi povus malsupreniri valen. Resti tie, en la restadejo, ne allogis min, ĉar mankis hejtrimejoj.

Nun la kirliĝanta glaci-neĝo penetris en ĉiujn krevajojn. Ni bordumis la Lagon de l'Ruinoj — ĝiaj akvoj apenaŭ videblaj fumis kiel tiuj de varma fonto — ĝis la Ponto de l'Ruinoj; mi antaŭeniris per grandaj klopodoj, la ĉamo de tempo al tempo haltis kaj turnis sian belan kapon al mi. Ni pasis preter la Ponto de Pjastroj, kaj tie, kun sincera bedaŭro, mi devis forlasi la belan beston, forigante ĝin per mia bastono; alie la vilaĝanoj certe ne akceptus ĝin tiel, kiel ĝia bela gesto indas.

De tiam mi ne plu iris por ĉasi ĉamojn.»

STEFANO JON

¡UNA BUENA OPORTUNIDAD!

Acaban de aparecer dos interesantísimos opúsculos del Profesor **Manuel Fernández Menéndez**:

El Esperanto en la opinión de hombres emigrantes y algunos hechos

[2.^a edición, muy aumentada]. Un folleto con nutrido material, de gran eficacia para la propaganda. Precio: 2 ptas.

Valor educativo del Esperanto

Notable estudio de 40 págs. [24 x 16], ilustrado con 10 fotograbados. Precio: 5 ptas.

Pedidos a:

HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO,

Ruzafa, 7 - Valencia

◆ LOS FUNDAMENTOS JURIDICOS DEL MOVIMIENTO ESPERANTISTA ◆

El movimiento esperantista, a parte de ser en sí una solución para el problema lingüístico, con su rápido y fácil aprendizaje del idioma que propugna, tiene forzosamente unas derivaciones inesquivables, que vamos a examinar a la luz del Derecho Natural, planteándonos el problema de si es algo indiferente en el aspecto moral que se pueda permitir o prohibir según los casos, o es ya un Derecho de origen Divino (por ser natural) que no se puede negar lícitamente a los hombres.

El Esperanto es una lengua solamente, y como tal, puede ser usada por hombres de todas las ideologías; reúne, además, la cualidad de auxiliar (es decir, no pretende desplazar a las lenguas naturales, como muchos erróneamente creen), y finalmente facilita la comprensión entre los hombres de distintos países, convirtiéndose en un instrumento del derecho de comunicación.

A los efectos de esta última consideración, veamos si su uso se puede negar. Nada menos que las más brillantes estrellas del Derecho Internacional, el español Francisco de Vitoria y Hugo Grocio (holandés), son las que suministran los argumentos para su legalización.

El insigne teólogo dominico del siglo XV, afirma rotundamente: «Existe un derecho de sociedad y comunicación que es natural», tal derecho se deduce de la propia constitución del mundo.

Para Vitoria la comunidad nació con el mundo, no existiendo originariamente otro régimen; siendo por todos constituida una modalidad: la libertad de comunicación. Posteriormente los hombres se fijaron en distintas partes de la tierra; algo de lo que inicialmente era común, se transformó en privado; pero la transformación no fué total; el asentamiento no pudo modificar lo que por

ser invariable, ante la acción del tiempo y la evolutiva vida de relación de los hombres, es preciso incluir en el derecho que a los hombres asiste de establecer entre ellos mutua comunicación; negar ese derecho equivale a condenar a confinamiento a la humanidad, y eso es una pena, y esa sólo a los que delinquen puede aplicarse.

No constituye acción punible la tendencia del hombre a desplazarse sin trabas y a comunicarse con sus semejantes.

Después de estos fortísimos principios, dice que ello puede quedar prohibido por causa de guerra justa.

Y después el insigne Vitoria examina si un pueblo puede oponerse a la realización del derecho de comunicación, y para ello analiza la naturaleza del mismo, si a los españoles no les fuera lícito viajar por países de indios (lo que era el problema de aquella época), sería porque se lo impidiera alguna ley natural, divina o humana. Ahora bien: por derecho natural y por derecho divino, ciertamente la comunicación es lícita. Si, por tanto, hubiera una ley humana que sin causa alguna prohibiera lo que está permitido por Derecho Natural y por Derecho Divino, carecería tal ley de fuerza obligatoria, por irracional e inhumana. Quien niegue estos principios se coloca al margen y en oposición a la comunidad internacional.

Poco queda, pues, que añadir. El uso del Esperanto por todos los pueblos de la tierra queda perfectamente legítimo, cuando se usa con fines pacíficos, y es un derecho que ni el Rey, ni el Parlamento, ni un referéndum pueden anular, porque es de derecho natural y divino el que los hombres puedan relacionarse con sus semejantes.

JOSE GUZMAN GUZMAN

Valencia. (Abogado)

El hombre, para vivir, no necesita, como los animales, adaptarse al ambiente, sino que ha logrado adaptar el ambiente a sus propias comodidades. Por lo tanto, ante la necesidad —cada día más perentoria— de un idioma auxiliar, común para todo el mundo, sería hoy absurdo esperar a que, por la lenta erosión de los siglos, se formase buenamente, por sí solo, el extraño lenguaje que resultaría de una mezcla de los idiomas existentes. Así, pues, de la misma manera que, sin esperar el crecimiento de unas alas naturales, el hombre vuela más y mejor que los pájaros; así también el genio de un hombre ha conseguido que la diversidad de lenguas deje de ser un obstáculo para comunicarse los pueblos. Por eso...

¿EL ESPERANTO ES EL LOGRO FELIZ DE UNA BELLA ILUSION?

ĈU VERE TROVIĜAS HISPANISMOJ EN ESPERANTO?

En la pasintdecembra kajero de nia Bulteno, sub titolo *Hispanismoj en Esperanto*, s-ano, kiu kaŝnome subskribas Azor, diras, eĥe al mia artikolo en «*Esperantologio*», n-ro 1, *Hispanidaj neologismoj en Esperanto*, ke mi povus esti aldoninta vortojn, kiaj *majoliko*, *mahoneco*, *kanario*, ktp, devenajn el hispanlingvaj loknomoj; aŭ kiaj *maizo*, *kafo*, *ĉokolado*, ktp, kiujn el Ameriko (ĉu ankaŭ *kafo*?) peris al la mondo la hispana lingvo, same kiel okazis por multaj arabaj, kiaj *alkazaro*, *moskeo*, *minareto*, ktp, post la iberia kunvivo ok jarcentojn kun la mahometanoj.

Mi ne volas kontesti al tiu, se ne konata tamen ŝatata, s-ano Azor, kiu tre bonveninde, kaj kun laŭdo por mia nomo, verkis sian artikolon. Tamen, se mi devus diri mian sinceran opinion, mi asertus, ke mi ne kredas je la ekzisto de hispanismoj en Esperanto. Kiel sciante, Zamenhof ignoris, inter aliaj, la lingvojn portugalan, hispanan, italan. Kaj lia hipoteza hispana praularo, kiun s-ano Azor aludas, neniel povis krei hispanlingvan mentalon. Koncerne la eldiron de doktoro Privat, ĝi preskaŭ same valorus por la lingvoj portugala aŭ itala. Kial? Car ja la bazo ne estas la lingvoj el tiuj landoj, sed la komunaj praromanidaj radikoj, t. e., la latina vortotrezoro, el kiu Zamenhof ĉerpis plimulton de sia radikaro.

Zamenhof, cetere, klopodis preni por sia lingvo plej internaciajn vortojn. Tio klarigas ke la aŭtenta fremdismo de esperanto rilate iun ajn el la eŭropaj ĉeflingvoj estas iom elasta, kaj la elcenta koincido —kiel ĉe la hispana— multfoje estas nur ŝajna kaj ŝuldata al bazlatinismoj kaj al komunikulturaj internaciaj vortoj. Por la vorthistorio de Esperanto, ankoraŭ science ellaborota mi ne kredas je la gravo de hispana aŭ itala reference-

joj. La lingvoj latina, franca, germana, rusa, angla —eble la po'a— estas la ĉefaj provizejoj. Car, ĉu oni povas diri, ekzemple, ke la vorto *ĵamboreo* estas zuluva leksikonaĵo en Esperanto, aŭ kontraŭe, pli ĝuste, ke ĝi, el Sudafriko, iĝis internacia vorto, kiun, pro tio, akceptis ankaŭ Esperanto?

S-ano Azor ne ŝatas la vorton *neologismo*, kvankam oficiala, kaj anstataŭe li uzas *novismon*. Mi dankas: jen formo salutinda, kiun mi certe uzos estonte, kiel mallongigo por (vort) *novismo* (aŭ ĉu prefere, kie! mallongigo de *nov*—(vort)—*ismo*, laŭ *neo-logismo*?). Sed nu —malicete, nur por inciteto—, kial s-ano Azor ne uzas, konsekvence, *prahemion* (mi pliŝatas la grafion kun *h*) anstataŭ lia *alkemio*, *konstruarton* anstataŭ lia *arkitektado* (ne tre trafa!), *terkul'uron* anstataŭ *agrikulturo*? Ĉu ne senbalastigo de superfluaĵoj igus nian Esperanton pli kerne esperanta? —Kaj kion signifas la «jam oficialigita» *mahoneco*, kiun mi ne konas? Ĉu eble *majonezon*, laŭ Plena Vortaro de SAT?

Fine, por la redaktistaro (ĉu ne pli esperanta, ol *redakcio*? Ja *redakcion* oni uzas ankaŭ por redaktejo, kaj ambaŭ konceptoj ne estas egal signifaj) de nia Bulteno: Kial vi dufoje metis ke mi verkis pri la novismo *Don-Kihoto*, grafiita kun ligstreketo kaj majuskloj? Mi ja klarigis la vorton *donkihoto* por la komunlingva homtipo, kiun naskis la ĉefheroo de Cervantes *Don Kihoto*. Tial, laŭ mia intenco kaj grafismo, vi devis esti metintaj *donkihoton*, ĉar kiuj ne legis mian artikolon en «*Esperantologio*» povus erare kredi, ke mi traktis kaj pledas je tiu neologismo sub la formo *Don-Kihoto*, kio vere ne laŭas la fakton.

J. REGULO PEREZ

Kanariaj Insuloj

TUTMONDA ADRESARO aperos jam definitive meze de Julio 1950. Do, vi, samideanoj, ne atendu la finon de Junio por vin anonci.

Enpresado de la adreso kostas 2 resp. kuponojn, enpresado kun la Adresaro entute 12 resp. kuponojn, maldekstre stampitajn. Unu resp. kuponon egalas al 1 1/2 leterafranko eksterlanden. Mendu tuj ĉe: *Internacia Esperanto-Muzeo, Hofburg, Wien I, Aŭstrio*.

Vere interesa kaj nepre leginda estas

MALGRANDA REVUO

LITERATURA DUMONATA GAZETO

Bela prezento, bonega papero, zorgo elektita enhavo kun densa teksto sen anoncoj

Unuopa ekzemplero al eksterlando: 3 rpk.

Redaktoro-Eldonanto:

S. ENGHOLM . Box. 25, HAGGE (Svedio)

Ha sido en Grecia, la Grecia inmortal, cuna de la civilización de Occidente, donde con la firma del Ministro de Educación fué cursada, el verano pasado, la siguiente circular, que ofrecemos a nuestros lectores, por considerarla de sumo interés para todos nosotros

REINO DE GRECIA

MINISTERIO DE CULTOS Y EDUCACION NACIONAL

DIRECCION DE ENSEÑANZA

Atenas 9 Agosto 1949

Núm. de Registro: 64.171

CIRCULAR NUM. 49

A LOS

Sres. Rectores de las Universidades de Atenas y Salónica, a los de la Escuela Superior de Ciencias Económicas y Mercantiles y Escuela Superior de Ciencias Políticas; a los Sres. Inspectores Generales de Enseñanza Media y Elemental, a los Sres. Directores de las Academias de Pedagogía y a los de las Escuelas Experimentales de las Universidades de Atenas y Salónica, y a los Sres. Directores de Enseñanza Media:

Considerando, que el medio más eficaz de comunicación espiritual entre los pueblos, tanto para sus relaciones, como para su hermandad, es, a parte de otros factores, el uso del idioma mundial llamado ESPERANTO, que está ya moldeado, difundido y utilizado en todo el mundo; recordando al mismo tiempo las anteriores circulares, a este respecto, con los números 55.517 de 28-10-1929, 65.896 de 7-11-1931, 59.433 de 28-10-1932, 94.066 de 9-10-1939, 71.639 de 28-8-1946 y 90.727 de 2-10-1946, «Acerca de la Enseñanza del Idioma Mundial ESPERANTO a los Estudiantes y Escolares», recomendamos nuevamente a ustedes que faciliten por todos los medios esta enseñanza, que han tomado a su cargo, sin remuneración alguna, los Profesores y Diplomados del Instituto Helénico Superior Esperantista de Atenas.

Además, consideramos muy oportuno, y absolutamente necesario, al comienzo de la enseñanza del ESPERANTO, que todos los que sean encargados de esta enseñanza a los estudiantes y escolares, así como a los maestros revalidados de la Nación, les aclaren y hagan comprender el gran significado y alto valor que tiene, para todos los pueblos, el aprendizaje y el uso de esta lengua, que permite las relaciones directas y el intercambio de opiniones y de ideas con el exterior. Debiendo recomendarse, finalmente, a todos los inscritos el máximo interés, puntualidad y atención, no sólo en los correspondientes cursos, sino también en la lectura del periódico «Helena Esperantista», órgano oficial de los esperantistas griegos, tanto para su propia instrucción como también, y principalmente, para que puedan estar al corriente del Movimiento Esperantista Mundial y de su ininterrumpida difusión en todos los países.

EL MINISTRO

K. TSATSOS

Comuníquese:

A las Direcciones de

Enseñanza Elemental, Media y Superior

y al Dr. D. A. Stamatiadis (Rodou n.º 23, ATENAS - 8 -).

ĈIU ESPERANTISTO, PER SIA KONDUCTO AŬ PER SIA EKZEMPLE

Sincere mi konfesas, ke grandan penon mi faris por eviti la tenton inundi tutplene la centrajn paĝojn de nia Bulteno per ŝaŭmanta torento da ŝablonaĵaj vortoj pri la belo de la vivo dum florado de printempo. Sed... ho, ve! Pli malpli eminentaj poetoj jam prikantis, ĝis enuo, la variajn nuancojn de ĉi tiu sezono: ebrio de parfumoj, danco de koloroj, trilado de birdoj kaj... ŝmaco de sonoraj kisoj, kiel deviga temo, tra la pompo de ĝardenoj, kie vante fieras la dianoj kaj frivo'e koketas la rozoj. Nu, sufiĉas por mia kroniko la simpla raporto, ke ankaŭ en foraj sovaĝaj anguloj, tra ampleksa kanvaso de paŝtejoj kaj herbejoj, sur la emajlo de la valoj aŭ sur deklivoj de la montoj, multenombraj diversaj herbetoj, kun humilaj sed ĉarmaj floretoj, stebas la punton de plej mirinda printempaĵo. Plaĉe mi rigardas al tiu ege vasta kaj tute natura tapiŝo; tre funde mi miras, ke nun ankoraŭ malmulte da homoj scias pri la perfekta estetiko de tiuj modestaj floretoj, kiuj povas elteni komparon kun plej multekostaj juveloj. Ili estu, do, hodiaŭ taŭga materialo por la freŝa girlando de mia printempa saluto al vi ĉiuj, ho karaj geamikoj, en ĉi tiu serena medio de maja posttagmezo, kiam ripoze mi legas dum blankaj papilioj flirtas en aero, kiu de tempo al tempo ekblovas, kiel vento, por pli facile ludi kaj petoli kun la obstinaj bukloj de mia griza barbeto de indulgema filozofo.

Kaj nun, ek' jam al la laboro! Jen do la parado de kelkaj revuoj, kiuj ne hezitis flugi ĝis la sudo por doni stimulon al mia, kaj nia, kaj via fervoro... ESPERANTO, la internacia revuo, vigne tamburas por tiu jam tre proksima kongreso en Parizo, kien avide iras la rigardoj de multaj kaj multaj esperantistoj. Oni raportas certe pri la sukcesaj paroladoj kaj prelegoj de D-ro Lapenna en Francio kaj Islando; estu specimeno pri tio informo el Reykjavik, ricevita en la Centra Oficejo: «Post unu horo, nia kara Prof. forflugos. Dum sia restado ĉi tie, li multe agis por nia movado, por nia societo... Ni gajnis grandegan trezoron spiritan. Ni ko-

rege dankas al la estraro de UEA pro alveno de D-ro Lapenna.» Sub titolo *Nia Forumo* oni malfermas novan rubrikon en tiu gazeto, kiu verŝajne altiros multe da atento inter la legantaro. SKOLTA MONDO aperigas bonegajn informojn pri la klopodoj enkonduki la scion de nia lingvo en la vicojn de la skoltismo; oni komentas telegramon de la norvega Reĝo, okaze de tutmonda roverjamboreo; li diris, ke «roverismo estas necesa por doni ekzemplon ne nur pri skoltarto, sed pri bona vivo».

INTER LA PROZO DE L

HEROLDO DE ESPERANTO daŭras en sia bela aspekto, kvazaŭ ordinara ĵurnalo; ne estas necese ĉerpi el ĝi apartajn fragmentojn, tial ke ĝi estas regule legata preskaŭ en ĉiuj esperantaj rondoj, danke al la malavara ago de la redaktoro kaj aliaj afablaj samideanoj. En SCIENCA REVUO duono de la kajero ŝtopiĝas per densa artikolo «La scienca tasko de Esperanto el konteoria vidpunkto» kiu estas vera galimatio por nefakulo; ĉar mi estas en tiu kazo, pri tio mi silentus, se ne enŝoviĝus en la artikolon kelkaj reformproponoj, embuskitaj sub la ŝirmo de scienca ŝelo, kaj pri tio eĉ plej modesta kaj laika esperantisto rajtas suspekti... La PŬNTO, oficiala revuo de la Germana Asocio, ĵus aperigis specialan numeron en germana lingvo, pri aktualaĵaj problemoj en rilato kun la bezono de nia lingvo internacia por apoksimigi la solvon, se ne jam ĝin trovi definitive. Belega estas la lasta eldono de ESPERANTO-POST, plia germana kolego, kiu semas sur bonan grundon la karajn ideojn de doktoro Zamenhof. DANSK ESPERANTO-BLAD sciigas, ke la Dana Internacia Student-Komitato aranĝas nunjare, same kiel pasintjare, Arkeologiajn Tendarojn por eksterlandaj studentoj. Sed ĉi-jare estas la bona ŝanco, ke

HELPAS AŬ MALHELPAS LA PROGRESON DE ESPERANTO!

unu el la tendaroj estas rezervita por esperantistaj studentoj. Jen do tre favora okazo por montri la favoran sintenon al nia movado de fakaj institucioj. En la sama numero estas aludo pri la Hispana Federacio, kion ni dankas kun plej bonaj deziroj. En SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN, la kompetenta samideano Farenc Szilagyí tuŝas tiklan punkton en tre bona artikolo, kiu meritas atentan legadon de ĉiu serioza samideano. Mi prezentas ĉi-sube longetan fragmenton, kiun certe studos niaj le-

pli, aŭ malpli emfaza maniero pri sia esperantisteco, ni faris sufiĉe. Ni ne povas konsideri esperantistojn tiujn, kiuj ne konas la lingvon. Tiuj personoj eĉ povas malhelpi la disvastigon de nia lingvo. Ii mem eble post la komenca kurso faris nenion, nur forgesis, kaj per sia malknava scio ili vekas la suspekton en la homoj, ke Esperanto estas malfacila.»

Jen, per salto de la imago, mi situas jam pli sude. KULTURA REVUO estas tre interesa informilo pri la slovakaj literaturo; ĝi enhavas trafikajn recenzojn pri diversaj verkoj, romanoj kaj teatraĵoj. Iu tute objektiva vidpunkto. L'ESPERANTO, oficiala organo de la Itala Federacio vigle kaj verve diras kaj rediras konvinkigajn argumentojn en itala lingvo; sed en Esperanto ankaŭ ĝi prezentas gravajn raportetojn, el kiuj kelkaj plene meritas adekvatan represon. SVISA ESPERO aspektas vere kvazaŭ gaŝa kaj sprita knabo, belaj kaj oportunaj vinjetoj heligas kaj «printempigas» la tekston, kiu cetere estas serioza kaj trafa; estu specimeneto jenaj vortoj el la prezidanta jarraporto: «Rigardante reen al nia laboro, oni vidas diversajn truojn! Tio signifas, ke multaj punktoj ne plenumiĝis laŭ nia deziro. Tamen, la plej grava demando, kiun ni devas fari al ni mem, estas ĉu ni sukcesis antaŭenpuŝi la aferon plian aŭ pliajn paŝojn; al tio sincere ni novas respondi: Jes!» ESPERANTISTA LABORISTO, sub lerta gvido de mia ŝatata amikino Robinsone svingas arogajn devizojn kaj ŝovas tiel nian lingvon en la bravajn ondegojn de la socialaj movadoj. Al tiu facila metaforo de la maro kaj ondaro, mi alkruciĝas por meti finon al la supervidado de pliaj gazetoj. La papilioj ankoraŭ malpeze flirtetas; ilia silenta flugado elvokas ĉe mi strangajn sentojn, ĉar tiuj blankaj makuletoj, kiuj kaprice kapriolas en aero, ŝajne estas la pensoj frataj de amataj konatoj, kiuj venas al mi sub tiel delikata formo, sciante, ke nur per potenco de la poezio oni povos renversi la palisojn, kiuj gardas la eniron de la sorĉa arbaro, kie por vi fantazias

ESPERANTISTA GAZETARO

gantoj: «Esti Esperantisto havas diversajn signifojn: tio signifas unuavice lingvan scion kaj, kio estas laŭ la instruo de la praktiko, eĉ pli grava afero: la konservon de la lingva scio. Esti Esperantisto estas multe pli komplika afero, ol aparteni al aliaj popolmovadoj. Abstinenculo havas antaŭ si nur unu celon: ne trinki alkoholaĵojn kaj, kompreneble, propagandi pri la danĝero de la alkoholisimo. Sed esti Esperantisto signifas kvante multe pli: oni devas lerni lingvon kaj dokumenti al la ekstera publiko, se estas okazo, ke la lingvo taŭgas, ke la ideo estas bona kaj ke en ĉiu tempo la Esperantomovado donis ion pozitivan al la internacia kunlaboro. Kiam oni pripensas ĉiujn detalojn, el kiuj nia movado kunmetiĝas, oni devas konstati, ke nia movado ne estas vere popolmovado laŭ sama maniero, kiel la abstinenca, koopera, aŭ vegetara k. s. movadoj. Ni uzas lingvon, kaj tial ni devas scii tiun ĉi lingvon. Ĝuste tial, ĉar ni ĉiam devas okupi nin pri la lingvo, nia tasko estas pli komplika ol tiuj movadoj, kie oni ne havas alian taskon, kie oni devas nur esti. Ni kredas, ke donante plenan estimon kaj simpatian al tiuj, kiuj finis siajn studojn per komenca kurso, kaj de tiam kontentiĝas nur per la

LITERATURO

FILO DE MALAMO

FRAGMENTO EL SAMTITOLA NOVELO DE J. DICENTA

Dum multe da tempo, tiu instigo al malamo, kiun Klotilde spertis, sentante en sia interno la frukton de vivo:upto kaj perforto, kreskis pli kaj pli, ĉe ĉiu nova trembato de la naskiĝonta infano.

Unu nokton, la skuo estis pli forta, pli intensa; kaj ĝi liveris doloron al la gravedulino. Tamen, tiun nokton la malamo, anstataŭ ol kreski, mal-kreskis, fandiĝis en la suferado de la virino, por transformiĝi en kompatio.

—Kian kulpon li havas? —murmuris Klotilde—. Mi ne povas lin mal-ami! Ve al mi kaj al li! Multe pli ankoraŭ al li, bedaŭrinde...

Kaj, dirante tion, en la menso de Klotilde, reapervis la tragika bildo de pasinta sceno: Si kaj la satiruso antaŭ la terura angoro de ŝia paralizita patro, kiu ne povis stari nek povis kriadi... Ĉiufoje, kiam en sia interno, ŝi sentis la malpezajn kaj dolĉan skuatadon de la nova estaĵo, ŝi vidis ne ja la malĉastajn pupilojn de la satiruso, sed la mutan doloron de la paralizita o fermanta la okulojn por ne vidi... Tamen, meze de tia malamo, stranga sento komencis invadi ŝian koron...

Tio ne estis amo, kio komencis vibri en la koro de Klotilde, sed tio estis ja la unua paŝo al la amo. Treege mallaŭte ĝi vibris, same ol kiam oni paŝas sur la pinto de la piedoj. Iom post iom, la vibrado fariĝis pli persista, pli forta. La gravedulino ĝojis perceptante ĝin, plilongigante ĝiajn ehojn, persekutante ilin kun ama sciemo, tra la anguletoj de sia spirito.

Ne plu estis jam tiel malhela la esprimo de ŝia vizaĝo, tiel amara la trajto de ŝia buŝo, tiel profunda la sulko inkrustita inter ŝiaj du brovoj, nek tiel malmilda la sinteno, per kiu ŝi sin oferis al la klaĉoj de l'publiko. La bildo de tiu satiruso, kun ruĝa barbo kaj elkavaj okuloj, ĉiam freŝa en ŝia memoro, kvazaŭ abomena marko, nebuliĝis iom post iom, montrante sin konfuza, ŝanceliĝema, sen enhavo.

Gis fine, komplete ĝi estingiĝis!

Kaj venis momento, en kiu la patrineco sukcesis venki super ĉio. La graveda virino triumfis sur la perfortita virino. La amo de patrino entombiĝis la malamon de virgulino.

Ruĝiĝinte pro honto, unu fojon pli, antaŭ la rigardoj, kiujn la paralizulo turnis al ŝia deformita ventro, Klotilde kisis sian patron kaj venis en la dormoĉambron, kie tuj ŝi komencis senvestigi sin.

La spegulo reflektis ŝian figuron.

Sia vizaĝo montris tiun aliĝon propran al ĉiu gravediĝo: fundaj blurondoj borderis ŝiajn palpebrojn, la nuanco de ŝia haŭto fariĝis pala, la esprimo de ŝia buŝo reĝis dolĉa kaj serena. En ŝia korpo mankis la sveltaĵoj de virgulino, anstataŭitaj de majesta deformiĝo, ne sen manko de beleco.

Ankaŭ la grundo deformiĝas kiam ĝin sveligas la disvolvo de la ĝermoj; kaj ankaŭ ĝi estas bela eĉ deformita pro la fekundiĝo.

Klotilde duonfermis la okulojn por sonĝi sendorme pri sia fileto. Forta skuo, tiel forta, kiel ankoraŭ neniam ŝi spertis, tremiĝis ŝian korpon: ambaŭ manojn ŝi portis al la ventro, kaj ŝi sentis la plenajn konturojn de sia infano. Tie li muldiĝis jam, kiel muldiĝas la argilo, malantaŭ la tuko per kiu la skulptisto ĝin envolvas, por ĝin ŝirmi.

Ĉe tia kontakto kun sia filo, la patrino eksplodis en ploron:

—Ho, filo de mia sango, filo de mia sango! —ŝi ekdiris— kaj, estinginte la lumon, ŝi enŝovis sin en la liton, atendante silente la naskiĝon de sia infano, por lin kisi kaj kisi, por daŭre lin karesi per siaj fingroj, tremantaj pro espero, tremantaj pro amo...

El la hispana lingvo tradukis

LUIS HERNANDEZ

MALNOVA SED BONA ŜTOFO UTILAS POR NOVA SOFO

La konsiloj kaj admonoj de D-ro Zamenhof, en la unua tempo de nia lingvo, neniam kaj neniel perdas aktualecon. Ofte okazas, ke ili estas pli oportunaj kaj trafaj nun ol tiam, kiam ili aperis. Tre plezure ni represas fragmenton de bela artikolo, kiu nia kara Majstro verkis dum la jaro 1892^a por la sola tiutempa gazeto «La Esperantisto». Superfluas, do, la plej eta rekomendo!

ĈU NI PROGRESAS?

de D-ro Lazaro Ludoviko Zamenhof

Ĉiun fojon, kiam la bruo en nia afero iom trankviliĝas, kiam pasas kelka tempo sen novaj videblaj faktoj, ni ricevas de kelkaj amikoj la demandon: «Ĉu nia afero progresas aŭ ĉu ĝi haltis?». Kelkaj el niaj amikoj pensas, ke afero progresas nur tiam, kiam ĝi bruas; tial la humoro kaj opinio de tiuj ĉi amikoj kun ĉiu tago alie ŝanceliĝas: kiam ili trovas en nia gazeto multajn konsolaĵajn novaĵojn, ili ekkrias: «Vivu Esperanto! Ni iras, ni venas, ni atingos baldaŭ la celon!». Kiam pasas kelka tempo sen novaj aperoj, tiuj ĉi amikoj venas al la konvinko, ke ni staras sur unu loko aŭ ke ni eĉ mortas; kaj ili perdas la kuragecon kaj lasas fali la manojn. Tamen, egale senkaŭzaj estas la tro granda ĝojo en la unua okazo, kiel ankaŭ la malĝojo en la dua.

Ni iras antaŭen regule. La celo lumas al ni ĉiam tiu sama, kaj ĉu hodiaŭ la cirkonstancoj estas pli favoraj, morgaŭ —malpli kaj postmorgaŭ denove pli— la veraj amikoj de nia ideo laboras trankvile kaj kun egala animo. De flanko bruo kaj de ekstera ŝajno neniel dependas la sorto de nia afero.

Ni devas brui, kiom ni povas; ni devas peni, kiom ni povas, krei ĉiam novajn faktojn por la okulo, ĉar... la blinda amaso tion ĉi amas kaj povas esti altirata la plej bone per tia maniero (la fakto, ke ni bedaŭrinde ne havas ankoraŭ la eblon, por sufiĉe brui kaj fari reklamon, multe malhelpas al ni en la altirado de la amasoj); sed por ni mem tiu ĉi bruo aŭ silento ne povas esti mezurilo de nia progresado aŭ starado. Plej granda bruo kaj ekstera brilo povas kovri sub si objekton tute senfundamentan, putran, mortantan aŭ jam mortintan, dum kontraŭe, nokta mallumo kaj morta silento povas kovri sub si objekton, regule kaj energie kreskantan kaj disvolviĝantan. Ni lasu al la amasoj, taksu la aperojn laŭ ilia ekstera brilo; se la amaso nun adoras ian luman meteoron, nenio ĝin detenos post kelkaj minutoj tute forgesi pri la meteoro, kiam tiu ĉi perdos sian malveran lumegon; se la amaso hodiaŭ silente rigardas aferon, malrapide sed konstante disvolviĝantan, tiu ĉi ne detenos la amason morgaŭ aliĝi al la afero nerimarkite kaj tiri el ĝi utilon. Ni lasu al la amasoj juĝi la faktojn laŭ ilia ŝajno, kiam ni mem volas scii, ĉu nia afero progresas aŭ ne, ni devas esplori la faktojn internajn.

Se venos iam la tempo, kiam la tuta mondo scios kaj uzos la lingvon Esperanto, tiam —neniu dubos— ni povos kuraĝe diri, ke nia afero absolute atingis la celon. Ju pli multe da homoj ekscias kaj ekuzas la lingvon, des pli multe ni proksimiĝas al nia celo, des pli multe ni progresas. Sekve, la sola efektive vera montrilo, ĉu ni progresas aŭ ne, estas la kreskado aŭ nekreskado de la nombro de esperantistoj. Ĉio alia estas nur rimedoj sed ne faktoj. Se eĉ la tuta mondo bruos pri nia afero, se nia afero brilas en ĉiuj publikaj lokoj, sur ĉiuj ekspozicioj de la mondo k. t. p., sed la nombro de la personoj, kiuj ellernas kaj uzas nian lingvon ne kreskos, tiam —malgraŭ la ŝajna potenco— ni devos diri, ke nia afero mortis, ke ĝia lumo baldaŭ estingiĝos, kiel la lumo de minuta meteoro; sed se eĉ la tuta mondo silentas, se ĉiuj obstine kovras antaŭ ni la okulojn kaj la orelojn, se nia afero longe ankoraŭ restas tute nekonata en la plej granda parto de la mondo, sed se la nombro de la esperantistoj regule, se eĉ malrapide restadas, ni povos kuraĝe diri, ke ni regule progresas, ke ni regule iras antaŭen, kaj ke la estonteco apartenas al ni.



FACETAS DEL MOVIMIENTO ESPERANTISTA

● **ALEMANIA.**—El Ministro de Comunicaciones, señor Schubert, reconociendo la utilidad del Esperanto, ha recomendado a los funcionarios del Ministerio el estudio de la lengua auxiliar internacional, como complemento de sus estudios.

En la Universidad de Hamburgo se instruye el Esperanto a cargo del doctor J. Weber. En la Universidad de Munich han tenido lugar los exámenes del curso de Esperanto a cargo del doctor Lichtenstein. En Westfalia se faculta a todo maestro, que esté en condiciones de dar un curso de Esperanto, para que libremente lo instruya a sus escolares. La tarea está en buenas manos.

● **ARGENTINA.**—El delegado argentino de «Internacia Sciencia Asocio Esperantista» ha colaborado en el hallazgo de unas enzimas, conseguido a través de los estudios del doctor Carlos Cardini, del Instituto de Investigaciones Bioquímicas de la Argentina, y del doctor Yukita Ohta, autoridad japonesa en enzimas. A fin de evitar las traducciones consiguientes, el doctor Ohta dirige en Esperanto sus investigaciones al delegado argentino de ISAE, señor Lázaro Musih, quien las transmite al doctor Cardini.

● **AUSTRIA.**—En la Universidad de Graz se ha instituido una aula de Esperanto en igualdad de condiciones a los restantes estudios lingüísticos que en dicha Universidad se cursan. El progreso en este aspecto es evidente.

● **ESTADOS UNIDOS.**—Ha tenido lugar en Estados Unidos el primer programa de televisión en Esperanto, siguiendo el ejemplo de la estación holandesa. El 9 de febrero, la estación del Consejo de Educación de Filadelfia transmitió una entrevista hecha al señor Robert P. Montgomery.

El señor Mark Starr, jefe de la Delegación norteamericana en las Conferencias de UNESKO ha hecho la siguiente declaración a la revista «American Esperanto Magazine» «Después de la Conferencia de UNESKO celebrada en Helsingor (Dinamarca) en junio de 1949, donde se sufrieron muchas confusiones y pérdidas de tiempo, a causa de la diversidad de lenguas, tuve la dicha de participar en una reunión en la Escuela Superior de Viskadalm (Suecia). Allí yo mismo oí muchas intervenciones, sobre diversos temas, solamente en Esperanto, sin experimentar ninguna confusión ni sufrir pérdidas de tiempo. Mi proposición de que UNESKO funde un Instituto para el estudio de la educación del Esperanto, fué aceptada en Helsingor provisionalmente, para dictamen, por un Comité asesor.»

● **FRANCIA.**—El periódico «Citoyen du Monde» (17-2-50) publica la noticia de que el Esperanto ha sido aceptado como lengua oficial en el programa de acción del movimiento federalista. Para todos es útil nuestro idioma.

● **FINLANDIA.**—«Tahtitaivas», revista de astronomía, editada por «Iurun Yliopiston Tahtitorni», contiene resúmenes en Esperanto. Dicho Observatorio astronómico de la Universidad de Turku mantiene correspondencia científica en el idioma internacional. En el terreno de la ciencia nuestra idea adelanta.

● **HOLANDA.**—«Hollandsche Decca Distributie N. V.» (van Baerlestr. 3-Amsterdam) ha editado un disco de gramófono con la «Marcha Esperantista», del compositor Jacob Feitsma. Y es... que la música también es internacional.

En Utrech, centro de la Red Ferroviaria holandesa, funciona un curso de Esperanto para el personal de ferrocarriles. En la «Escuela U. L. O.», de Amersfoort, el Esperanto se enseña como asignatura obligatoria, participando en el curso 75 escolares..

● **JAPON.**—Se ha constituido la «Asociación Católica Esperantista», que ha publicado un catecismo en Esperanto y edita «Esperanta Katoliko».

● **SUECIA.**—El Ayuntamiento de Karlskoga (Varmland) ha publicado en Esperanto un opúsculo de 56 páginas sobre la administración municipal de la población.

● **GRECIA.**—En los centros universitarios y culturales del país, el Esperanto goza de grandes simpatías, y de creciente difusión, gracias a las muchas disposiciones, favorables a su enseñanza que, por parte del Gobierno, se le dispensa desde hace años.

La mejor manera de favorecer al Esperanto en España es inscribiéndose en
HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

Socio de número ...	12	pts. anuales
Socio abonado.. ...	25	»
Socio protector... ..	50	»

Las dos últimas categorías dan derecho a la recepción de nuestro Boletín.

Libros recibidos

U. E. A.—Jarlibro 1950 (unua parto).
Neaĉetebła, sed ricevebla nur de Individuaj Membroj de U. E. A. laŭ kotizoj sur paĝo 46, pageblaj rekte ĉe.

Universala Esperanto-Asocio.

Heronsgate

RICKMANSWORT (Herts.—Anglujo).
aŭ ĉe ĝiaj reprezentantoj.

El Jarlibro es un opúsculo propiće para la labor pro Esperanto que realiza U. E. A. por la serie de datos en el mismo consignados, todos los cuales son fuente de informaci3n conveniente para que el esperantista pueda m3s f3cilmente encontrar la relaci3n mundial que pretende conseguir.

La lista de asociaciones internacionales de fines determinados y peculiares, colaboradoras de la universal asociaci3n neutral; la de asociaciones nacionales, fomentadoras del Esperanto en cada pa3s y, principalmente, la relaci3n de «deligitoj» y «fakdelegitoj», los cuales representan los eslabones de la gran cadena del Esperanto son datos que este Jarlibro refleja plenamente.

Un cuadro de la prensa del movimiento, una relaci3n de obras publicadas durante los dos 3ltimos a3os y de las editoriales esperantistas, a la par que gui3a, es un 3ndice elocuente de la difusi3n del Esperanto en el mundo entero.

En suma, una obra pr3ctica y de uso frecuente para todos los esperantistas.

PUBLICACIONES ESPERANTISTAS

Cada d3a se enriquece m3s la bibliograf3a esperantista con variados t3tulos, que abarcan las distintas ramas del saber humano. Para toda persona con afanes de saber y con gusto para la buena lectura, es un regalo y un placer el poder reunir en su biblioteca una curiosa colecci3n de libros que han sido editados e impresos en todas las naciones del mundo. S3lo con ense3ar estos vol3menes se puede convencer a los esc3pticos, que creen a3n que el Esperanto es una co3a intrascendente; pero que a la vista de todo lo que hasta hoy se ha publicado, seguramente cambiar3an de opini3n y... tal vez se transformar3an en los m3s fervorosos propagandistas de nuestra idea. Las obras m3s famosas de la literatura mundial no pierden su colorido original al ser traducidas al Esperanto, que con esta prueba a que ha estado sometido ha demostrado plenamente su merecido t3tulo de idioma literario e internacional.

BONHUMORA ANGULETO

HO, KIA FIASKO!

Mi multe ŝatis la babiladon de mia maljuna amiko D-ro. Modesto. Tre ofte, ni promenis dum longaj horoj, tra ĝardenoj kaj riverbordoj, ĉar lia babilado ĉiam estis instrua kaj ĉarma. Li atentigis min pri danĝeraj agoj kaj forgesoj, kaj ĉiam li citis, flanke de siaj konsiloj, anekdotojn kaj rakontojn; kiujn mi neniam forgesos.

Jen kiam li rakontis al mi iun tagon, post interesa parolado, pri manko de atento: «Antaŭ kelkaj jaroj, mi ripozis dum ferio en montara urbeto. Kvankam mi penis kaŝi mian profesion, por eviti laboron al mi kaj malutilon al du tieaj kolegoj, mi devis urĝe operaci vilaganon, kiu suferis gravan vundon, pro defalo de sur alta figarbo. Unu el la lokaj kuracistoj helpis min, kaj la alia bonvolis narkoti la malfeliĉulon. Ni laboris jam pli ol duonhoron, kaj la edzino de mia paciento angore rigardis lian mienon; ŝi rimarkis, ke la narkotisto plej ofte tuŝetis la okulon de ŝia edzo, por bone mezuri la profundecon de la narkotado. Fine, ŝi kuraĝis demandi: «Kial vi tiom ofte tuŝetas la okulon de mia edzo?». La narkotisto afable respondis: «Por bone kontroli la profundecon de la narkotado.» La virino rigardis lin iomete surprizita, kaj decideme ŝi aldonis: «Ĉu ne pli bone tuŝeti la alian okulon?, ĉar... tiu, kiun vi ĵus tuŝetas, estas kristala!».

D-ro. CIRANO

INTERPLANEDA TURISMO

Tre aktualaj temoj estas, sendube, la interplanedaj veturoj kaj la ebleco viziti nekonatajn mondojn. Multon mi legis pri tio, sed najbara vilaĝano ankaŭ ŝatas scii pri novaj aventuroj. Lastajn tagojn, ĵurnalo raportis pri estontaj interplanedaj flugadoj. Serce mi diris al mia najbaro:

—Jen, se vi deziras flugi ĝis la Luno aŭ Marso, aŭ ceteraj planedoj, pretigu jam viajn valizojn, ĉar la unua flugado estos preta antaŭ ol 25 jaroj. Petu do la pasporton kaj aĉetu jam specialajn vestojn por tiom eksterordinara vojaĝo.

—Dankon! Tuj mi petos la pasporton kaj aĉetos la vestojn. Krom tio, kiam mi atingos la unuan planedon, neniel mi forgesos sendi al vi salutleteron per fluganta telero!

MIGUEL TARRAGO

★ LA LERNEJO

CONSULTORIO LINGŬISTICO

J. P., en Paiporta.—Es verdaderamente lamentable que carezamos de buenos diccionarios de Esperanto. Nosotros queremos editar uno; pero ¿se da usted cuenta del dinero que se necesita hoy para editar libros? Estamos muy confiados en que todos los esperantistas de España nos presten su ayuda; si ello se realiza, esté usted seguro que contaremos con lo que necesitamos para editar gramáticas y diccionarios. Entonces la propaganda se podrá hacer bien, para que llegue a todo el mundo, con los libros que se requieren. Si está usted interesado en adquirir el diccionario **PLENA VORTARO**, es muy posible que en breve se lo podamos proporcionar, ya que estamos haciendo gestiones para traer algunos ejemplares. Y después de este preámbulo, contestamos su consulta sobre el verbo **esper**, debiendo aclararle que no lo debe emplear nunca en el sentido de **atendi**. El primero significa **tener esperanza**, y el segundo, **aguardar**. Por ejemplo: **Mi esperas, ke vi estos sana; mi atendas vian leteron**. A continuación damos a usted el significado de los vocablos esperantistas que le interesa conocer: **floko**=copo; **papriko**=pimentón; **relikvo**=reliquia; **emerito**=jubilado.

Tre plezure ni akceptos kaj publikigos kroniketojn kaj artikoletojn de niaj legantoj. Tiamaniere la enhavo estos pli varia kaj interesa. Sendu la materialon al nia redakcio:

HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

Ruzafa, 7 Valencia (Hispanio)

PARA NUESTRO BOLETIN

5.ª lista de donatidos (MAYO 1950)

Suma anterior	430 Ptas.
Teresa Ferré (Alcover)	5 »
Gaspar Vilar (Valencia)	10 »
Miguel Tarragó (Almatret)	10 »
Elsa Wolff (Santa Cruz)	25 »
Manuel Noguera (Alicira)	15 »
Francisco Roglá (Valencia)	5 »
Eduardo Capdevila (Barcelona)	3 »
Francisco Alsina (Barcelona)	50 »
Emilio Prades (Valencia)	10 »
Mari-Rosa (Valencia)	24 »
Manuel López (Callosa de Segura) ...	5 »
Total	592 »

¡GRACIAS, Y... ADELANTE!

NEPRE devas brili la verda stelo sur brusto de esperantisto



Ni havas stokon je via dispono laŭ apuda modelo (butono aŭ broĉo) po 6 pesetoj

Mendu tuj al
Hispana Esperanto - Federacio

RUZAFa, 7 - VALENCIA

ANONCETOJ

Ni akceptas anoncetojn kiuj rilatas al nia afero. Unu peseto au unu r-k. validas por du vortoj. Tri mallongigaj literoj valoras kiel unu vorto. Aparta tarifo por specialaj anoncoj.

DR. E. TUDELA.—Ruzafa, 43. Valencia. Dez. koresp. kun ĉiulandanoj pri div. temoj. Respondo garantiata.

JOSE NAVARRO. Calle Llull, n.º 208, 4.º, 1.ª, Barcelona, deziras koresp. kun la tuta mondo pri ĉiuj temoj.

ANTONIO PASTOR. Ercilla, 49, 5.º, Bilbao (Hispanio). Dez. interŝ, il. pkt. eksterlande. Certa respondo.

J. VIGO MESTRE.—«El Barato», Martinet de Cerdaña (Lérida), deziras korespondi kun fremdaj samideanoj pri arto kaj moroj.

GERMANIO. — SIEGFRED BREZINSKI - Bahnhofstr., 12 (21 a) Bockum-Hovel (Vestfalio) - deziras koresp. kun gesamideanoj el Valencio.

JAPANIO.—RIOKITI KAMIYA-Sangyo Hukko Kodan - 35, Higasi 3 bantyo - SENDAI - serĉas gekorespondantojn hispanajn por japanaj geamikoj.

NEDERLANDO.—H. J. BELLARD - VRIESPLEIN, 5 DORDRECHT deziras interŝ p. m. kun hispanoj.

LA INTERLIGILO

FRANCA MONATA ELDONO

Jarabono: 10 pesetoj - Anoncoj: senpage

Sendante la koston de la afranko oni ricevos provexempleron

Delegito: J. MASET - Apartado 15 - FIGUERAS (Gerona)

HEF-ANO: Helpu la eldonadon de nia Bulteno acetante kroman ekzempleron por via eksterlanda korespondanto. Unu ekzemplero, du pesetojn.